FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA
H E F

Año V (N.º 59)

# BOLETIN

DE LA FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA

Núm. 11

NOVIEMBRE 1953

RUZAFA, 7
VALENCIA
(ESPAÑA)

## AL DECLINAR EL AÑO ◆◆

Al terminar, en el próximo Diciembre, el quinto año de vigencia de nuestro Boletín, parece obligada tarea preparar el examen de nuestras actividades, como portavoces del esperantismo español, representado por la Federación que a todos nos agrupa. El esperantismo actual, en marcha ascendente, dista mucho de ser aquel de hace seis años, cuando, con entusiasmo, pero sin ningún otro elemento, nos lanzamos a lo que para entonces era una gran aventura: fundar la Federación y, despreciando las adversas condiciones del momento, emprender la publicación de nuestro órgano oficial, con el propósito de no dejar de publicarlo, por difíciles que fuesen las condiciones económicas de su administración. Por fortuna, nuestro entusiasmo se vió correspondido inmediatamente por la casi totalidad de los esperantistas españoles, siendo cada vez menos los que permanecen apartados de nosotros, al comprobar que nuestra actuación es diáfana, honrada y fiel a los altos y nobles principios de cultura y progreso que el Esperanto representa.

Grande es nuestra satisfacción al comprobar que en toda España, muy especialmente en aquellas regiones en que el esperantismo tuvo gran difusión, vuelve el antiguo fervor y que, bajo los auspicios de nuestra Federación, se aúnan esfuerzos, desaparecen aprensiones personales y se supedita todo a la unión, para mayor esplendor y difusión de nuestro objetivo idiomático. En ese camino no podemos ni debemos regatear elogios a quienes trabajan abnegadamente para coordinar voluntades, con generosa exclusión de sus puntos de vista personales o de su bien ganado prestigio. El nuevo aspecto del esperantismo español reclama nuevas figuras que, alentadas y aconsejadas por experimentados veteranos, irán ganando práctica y eficacia. Para los que hemos batallado en las horas más duras, el mejor premio es ese: contemplar que nuestros esfuerzos no han sido baldíos; y así, desde el remanso de nuestra nueva postura, podremos comprobar que en nuestro país se cultiva y difunde el idioma de Zamenhof, ese precioso vehículo de compenetración e inteligencia entre los pueblos. A los que no siendo esperantistas contemplen y juzguen nuestra actuación, nuestros sacrificios y, de vez en cuando, nuestras amarguras, les puede parecer que nos tomamos demasiado interés por algo que, al fin y al cabo, no es más que un idioma, y que no vale la pena de convencer a las gentes de algo que no les importa, y sin lo cual se ha podido vivir hasta ahora.

A estos debemos contestarles diciendo que toda persona, que está en posesión de un elemento capaz de mejorar la condición humana, tiene el sagrado deber de difundirlo, sea un medicamento heróico, una herramienta capaz de ahorrar cansancios y penalidades o simplemente un medio para hacer la vida más grata al género humano. Pues bien; para nosotros, el Esperanto reúne estas tres condiciones: es remedio práctico, es instrumento de paz y es insustituible recreo para el espíritu. Motivos son estos que se bastan para que deseemos que todos participen de nuestra dicha; por eso, cuando recibimos de algún indocumentado —o de algún malvado—, una alusión burlona, despectiva o malintencionada nos produce, más que molestia y fastidio, una sensación de profunda e intensa lástima.

Al acercarse la fecha en que los esperantistas de todo el mundo celebran el aniversario del nacimiento del Dr. Zamenhof, el gran filántropo que nos legó su precioso idioma, todo buen samideano debe honrar su memoria y agradecer el inapreciable don que ha recibido, perfeccionándose, en lo posible, en el uso del idioma, divulgándolo siempre por todos los medios en que sea factible; y, finalmente, prestando su entusiasta colaboración a las organizaciones locales y a la Federación que, sin tregua ni reposo, luchan para que, al declinar cada año, podamos comprobar con satisfacción que el balance es positivo y que en todas las regiones españolas se desenvuelve, con noble empeño, la tarea divulgadora del idioma auxiliar internacional Esperanto, como segundo lenguaje para todos.

## ✪ KURIOZA JUĜO ✪

Same kiel la paseroj, sur arboj de aleoj aŭ grandaj promenejoj, tiel ankaŭ en kelkaj barcelonaj placoj svarmas grizaj kaj blankaj kolomboj, kiuj paŝas aŭ flugetas inter la piedirantoj, manĝante grajnetojn de sur la planko, aŭ rekte de la manoj de multaj personoj, precipe de infanoj.

Tiuj birdoj donas ĉarmon al la urbo; pro tio la urbestraro zorgas pri ili. Akorde kun tiu zorgemo, antaŭ ne multe, du virinoj denuncis al urba policano, ke iu sinjorino portis enfermita en sia mansaketo vivan kolombon. La policano ordonis al la sinjorino malfermi la saketon. Efektive, el ĝi tuj forflugis blanka kolombo. Sub akuzo de ŝtelo, la sinjorino venis antaŭ juĝisto, al kiu ŝi deklaris, ke ŝi ne kaptis la birdon, sed ĝi troviĝis en la saketo, kiel unu el multaj ŝercoj de ŝia edzo, kiu estas iluziisto.

La juĝisto, antaŭ ol verdikti, venigis ŝian edzon, por scii, ĉu la sinjorino diris veron. Venis la iluziisto, li prenis la saketon de sia edzino, enmetis naztukojn kaj tuj eltiris plurajn blankajn kolombojn, kiuj forflugis tra apuda fenestro. Mirigita je tia lerteco, kaj plene konvinkita, la juĝisto absolvis la sinjorinon.

**SAMUELO ROCA-RODÓ** (Barcelono)

## ◆ LA ROZO DE AMO ◆

**Laŭ dana popola kanto**

Belega kaj ĉarma somera tag',
en sia tuta gloro,
ĝojigas kaj benas nin per la ag'
kaj amo de Sinjoro.
Ĝi tiras florojn el la ter',
kaj rozojn ruĝajn kun prefer'
memoras via koro.

Ĉar inter la floroj elektas mi
la rozon antaŭ cento.
Ravega kaj dolĉa aspektas ĝi
kaj ĝia ĉarma gento.
Abundas belaj kie ajn;
sed diras mi, ke, laŭ la ŝajn':
li estas eminento.

Se tage mi iras sen pacienc'
egale kie estas,
senĉese vi loĝas en mia pens',
kaj nokte same restas.
Kaj kiam dormas dolĉe mi,
feliĉe ŝonĝas mi, ke vi
ĉe mia koro nestas.

Esperantigis: **Poul Thorsen**
Kopenhago (Danlando)

## KONSILO DE SAĜULO

*Kondutu en viaj agoj kiel eble plej firme kaj decide. Estu konstanta eĉ en la dubaj opinioj, se jam elektitaj, kvazaŭ ili estus tute certaj; imitante tiujn vojirantojn, kiuj, erarintaj en arbaro, ne devas konfuze ĉirkaŭvagi nek halti, sed marŝi ĉiam kiel eble plej rekte, laŭ difinita direkto, ne ŝanĝante ĝin pro banalaj motivoj, eĉ en la okazo, ke oni elektis ĝin hazarde; ĉar tiel, se oni ne venos, kien oni intencis, almenaŭ oni atingos lokon, kie, kredeble, oni troviĝos pli komforte ol meze de la arbaro.* **DESCARTES**

## SFINKSA ANGULETO

### LA KUNVENO

En esperantista kunveno ĉeestis 250 personoj, laŭ jena distribuo: 30 infanoj malpli ol virinoj kaj 10 virinoj malpli ol viroj.

**Kiom da viroj, virinoj kaj infanoj kunvenis?**

Oni akceptos solvojn ĝis 23. Decembro.

SOLVO DE LA PROBLEMO

### LA BICIKLETO

EN LA PASINTA NUMERO

*Antono ekiris sur la bicikleto, kaj Jozefo piede. Ĉe la kvina kilometro (duono de la vojo) Antono lasis la bicikleton kaj daŭris piede. Kiam Jozefo venis al la loko, kie troviĝis la velocipedo, rajdis sur ĝi kaj atingis sian fraton, ĝuste ĉe la limo de la dek kilometroj.*

## ESTAS UTILE SCII, KE...

El inter 1.000 naskitaj personoj, nur 253 sukcesas atingi 40 jarojn.

—

La fero plenumas, en la organismo, la funkcion formi hemoglobinon, ruĝa substanco troviĝanta en la sango.

—

Neniu dormiĝas aŭ vekiĝas subite. Unue estas tempodaŭro, pli malpli longa, inter ambaŭ kazoj. Dum tiu stato, oni povas percepti sonojn, sed ne paroli.

—

La ovoj de la lampiroj estas lumaj, sed la insektoj elirintaj de ili ne posedas sian karakterizan lumon, ĝis plena kresko.

## SALO POR LA SALATO

—Ho, kiel plaĉa knabeto! Li ja havas la saman nazon de sia patro, la samajn okulojn, la saman buŝon...

—Jes, kaj la saman jakon!... Ankaŭ ĝi estas de paĉjo! **EMILIO PRADES** (Valencio)

# PROJEKTO DE MEDICINA VORTARO HISPANA - ESPERANTA

## de D-ro Ernesto Tudela - Valencio

**1887 - 1953.** Post kiam nia karega Majstro Zamenhof, tiel klera kuracisto kiel lerta poligloto, pretigis la manuskripton de la unua broŝuro: «D-ro Esperanto. Lingvo Internacia. Antaŭparolo kaj plena lernolibro», longe dum jaroj li vane serĉadis eldoniston; ĝis fine, en Julio 1887. li mem eldonis sian verkon. Kaj 66 jarojn poste, mi, modesta kuracisto zorgis pri la aranĝo de Medicina Vortaro «Hispana-Esperanta» kun proks. 30.000 vortoj. Preta estas jam la manuskripto por ke pli kapablaj kaj lertaj kolegoj de H. E. K. A. (Hispana-Esperanto-Kuracista-Asocio) bonvolu fari al ĝi la necesajn korektojn.

La ĝenerala «Plena Vortaro Hispana-Esperanta» (kun proksimume 50.000 vortoj) kies aranĝon oni komisiis al mi, okaze de la Valencia Kongreso en 1952, baldaŭ estos preta por revizio; kaj, tuj kiam mi ĝin finos, mi entreprenos la duan parton de la Medicina Vortaro. Tamen, ĉar mi konsideras, ke la eldonado estas neebla entrepreno por mi sola, kaj tro granda eĉ por la hispanaj kuracistoj nur, mi min turnas al ĉiuj el la hispanlingvaj teritorioj por kiuj la verko, certe, ankaŭ liveros utilon. Nun, jen speco de specimeno:

### TABLA ALFABÉTICA DE LOS HUESOS - ALFABETA TABELO DE LA OSTOJ

Astrágalo, *astragalo*
Atlas, *atlaso*
Axis, *epistrofo*
Calcáneo, *kalkaneo, kalkanosto*
Clavícula, *klaviklo*
Coccix, *kokcigo*
Cornete inferior, *suba konĥo*
Costilla, *ripo*
Coxal o ilíaco, *koksosto, iliumo*
Cúbito, *ulno*
Cuboides, *kuboido-osto*
Cuñas, *kojnoj, kojnoformaj ostoj*
Escafoides del corpo, *naviklosto*
Escafoides del torso, *skafoid-osto*
Escápula, *skapolo*
Esfenoides, *sfenoidosto*
Esternon, *sternumo*
Etmoides, *etmoido-osto*
Falanges, *falangoj*
Fémur, *femur-osto*
Frontal, *fruntosto*
Ganchoso, *hokosto, hokojdosto*
Grande del corpo, *grandosto, kapkavosto*
Hioides, *hioido-osto*
Húmero, *humero*
Lagrimal, *larmosto*
Malor o pómulo, *zigomosto, vangosto*
Maxilar inferior, *mandiblo*
Maxilar superior, *makzelo*
Metacarpianos, *metakarpearo*
Metatarsianos, *metatasaro*
Occipital, *okcipitosto*
Omoplato, *skapolo*
Palatino, *palato-osto*
Parietal, *pariet(ost)o*
Peroné, *fibulo*
Piramidal, *triketrosto*
Pisiforme, *pizoformosto*
Propio de la nariz, *nazosto*
Radios, *radiuso*
Rotula, *patelo*
Sacro, *sakro*
Semilunar, *lunosto*
Temporal, *tempiosto*
Tibia, *tibio*
Trapecio, *multangula grand-osto*
Trapezoide, *multangula malgrand-osto*
Unguis o lagrimal, *larmosto*
Vértebra, *vertebro*
Vómer, *vomero*
Vermiano, *vormian-osto*

**ATENTIGO!** S.A.T. komunikis al ni, koncerne la reklamfolion pri «Ilustrita Vortaro de Esperanto», aldonitan al la n-oj 8-9 de BOLETIN, ke diversaj legantoj evidente erariĝis pri tiu eldonaĵo, opiniante, ke ĝi estas la «Plena Ilustrita Vortaro», kiun preparas S.A.T. kiel daŭrigon kaj kronantan perfektigon de sia konata *Plena Vortaro*. Fakte, la laboraĵo de S-ro Azorin havas nenion komunan kun tiu estonta eldonaĵo, kiu prezentos la frukton de longjara, zorga kompilado, kun celo esti la plej fidinda konsultilo en la manoj de la Esperantistaro. Dume publikiĝos, en Januaro 1954, la kvara eldono de «Plena Vortaro» de S.A.T. kun tute nova *60-paĝa* aldono el terminoj ĉiufakaj, sciencaj, teknikaj, beletraj kaj komun-vortaraj, elektitaj kaj prilaboritaj de nombro da fakaj aŭtoritatuloj, en finkompilo de profesoro G. Waringhien

# LAŬTPAROLILO DE LA ESPERANTISTARO

## OPINIOJ KAJ SUGESTOJ

Bonvolu permesi al mi, jam duan fojon, tedi la legantojn de BOLETIN, kaj nian afablan redaktoron, per malgranda sed seriozega artikolo. Temas pri problemoj kiuj ĝenis min dumlonge, kaj foje ankaŭ aliajn amikojn. Ili estas: 1.e la celo de esperantismo; 2.e nia propagand-kaj organiz-sistemoj, kaj 3.e vereco en nia propagando.

1. Esperantistiĝante, mi legis en propagandiloj, ke ni celas unuigi la mondon lingve, kuraci la mondon kontraŭ ĝia superstiĉa kredo pri vivo natura de lingvoj, kaj helpi kiel eble plej multe la internaciajn rilatojn. Mi kredas, ke ni ankoraŭ pretendas celi tion. Sed, bedaŭrinde, mi baldaŭ trovis, ke ni faras la malon. Plenaj de timo, ni forgesis nian veran celon, kaj komencis agadi kontraŭe. Ni ne plu celas unuigi la mondon lingve. Ne. Anstataŭ ĝoji pri la bilingvismo, ekzemple; anstataŭ kuri renkonten, donante ĉian helpon kaj subtenon, ni tuj skribis koleregajn leterojn al la fondintoj. Anstataŭ ĝoji pri la eblo akiri finfine vere funkciantan internacilingvan sistemon per naciaj lingvoj, aŭ pruvi per praktika sperto, ke naciaj lingvoj fiaskas sur tiu tereno, ni timoplene kredante, ke fakte la naciaj lingvoj superas nian karan Esperanton, kaŝis niajn vizaĝojn en la brusto de nia panjo, la lingva superstiĉo, kaj ploregis, Ĉar jen la dua punkto: Dum jaroj ni propagandadis, ke fabrikita lingvo samvaloras kiel iu alia nacia viva lingvo; ke la idiotismoj aŭ la lingvaj strangformoj neniam donas misteran vivon al lingvo. La latina, la franca, la hispana lingvoj ne pli vivas ol Esperanto. Sed nun, ankoraŭ dirante tion, ni diras, ke neniam nacia lingvo povos esti universale uzata, ĉar lingvo nepre kunhavas la tradiciojn, la kulturon, la sentojn, la pensojn de popolo; kaj neniu volas ke Hispanujo estu regata de angla kulturo. Paradokso mirinda! Unuflanke, lingvo estas viva pro uzo, ne historio; aliflanke, lingvo, ne grave kiu ĝin uzas, estas historio kaj tradiciaro influanta ĉiun. Ĉiu filozofo, de Platono tra Dewey, certe tremas en sia tombo je tiu paradokso superba! Tamen kelkaj, solvinte la paradokson, diras, ke ne; ankaŭ Esperanto havas kulturon, kvankam ne ununacian, sed tiun de la tuta mondo. Interese! Hispano parolante esperante kun franco ne estas regata de fremda kulturo, sed parolante angle kun franco estas regata de la angla kulturo. Tamen diferenco inter Esperanto kaj nacia lingvo viva ne ekzistas. Dua paradokso por kiu solvis la unuan.

Sufiĉe! Estas la morala devo de esperantisto batali plenforte por internacilingvismo, ĉu temas pri Esperanto, Ido, Interlingue, Bilingvismo, aŭ io alia. Ĉiu esperantisto morale devas batali kontraŭ la fanatikaj movadoj por revivigi la hebrean, la kimran, la skotan... lingvojn. Sed rigardo al niaj gazetoj seniluziigas tiun, kiu kuraĝas kredi, ke ni esperantistoj plenumas nian celon, en tiu direkto.

2. Ni havas strangajn kutimojn en Esperantujo. Laŭ UEA-statistikoj *(Esperanto* p. 176-477, kaj p. 63, jaro 1952) se oni komencas kurson de 100 personoj, el ili 39 finas la kursojn, kaj unu sola persono aniĝas al organizo. Kial tiom multaj ne emas aktiviĝi esperante? Precipe, ĉar ili povas esti *esperantistoj* sen scii la lingvon! Preskaŭ neniu nacia gazeto esperanta estas tute en Esperanto. «Jes», oni respondas, «ni finance devas havi dulingvajn gazetojn, por propagando». Mi diras, ke ne. Kaj mi volas montri kiel eblas forigi la barieron:

1. Ĉiu membro de asocio pagu saman kotizon, sufiĉan por pagi la koston de la naciasocia gazeto kaj iom pli por la organizado ktp. Ĉiu membro, senescepte. 2. La asocio (aŭ, prefere, UEA) starigu kompetentajn ekzamenojn. Ĉiu membro rajtu ekzameniĝi. 3. Membro ne ekzameniĝinta, aŭ malsukcesinta en la ekzameno, ricevu nur nacilingvan propagandgazeton, kiu enhavu ankaŭ provtekstojn, lernhelpojn, ktp. 4. Membro, kiu sukcesis pri la ekzameno ricevu ankaŭ, krome, la nacian tutesperantan gazeton, kiu estu 2-3 oble pli granda ol la propaganda gazeto, se ne pli. Pagante la saman kotizon, ĉu oni ricevas ambaŭ gazetojn aŭ nur unu, preskaŭ neniu kontentus resti sen bona scio pri la lingvo, sed oni tuj ekstudus por povi sukcesi pri la ekzameno kaj ricevi do pli grandan kvanton da eldonaĵoj. Simile, nova studanto rapide klopodus akiri sian scion. Por pagi la kostojn, samlingvaj nacioj komune eldonu la propagand-gazetojn,

# ◆ LINGVA KONKURSO: LERNU TRADUKANTE! ◆

**Kun la celo stimuli vian laboremon, ni proponas al vi la sekvantan ekzercon:**

Tasko n.° 9. TEKSTO: «Maria faris ĉion. Ŝi balais la ĉambron, ordigis la bibliotekon, pendigis afiŝojn. Vespere, ŝi estis la lasta, kiu forlasis la ejon, fermante ĝin kaj kunportante hejmen la ŝlosilon. La maldika figuro de Maria konstante moviĝis. Ŝi havis ĉiam ion por fari; ŝi atentis ĉiun, sed ŝin atentis neniu. La knabinoj ne estis ŝiaj amikinoj, ĉar nur ili turnis sin al ŝi, se ili bezonis ion. Por la junuloj, la malsaneca Maria, en la blanka bluzo kaj nigra jupo, signifis nenion. Ili amindumis al Elza kaj Roza, la reĝinoj de la Grupo. Maria estis necesaĵo, ne virino. Okazis, ke frue veninta junulo demandis al Maria: Ĉu neniu knabino estas ankoraŭ ĉi tie?» *El originala romano de Emba pri la vivo en esperantista Grupo.*

**Kiel kutime, arangu adekvatan tradukon kaj sendu ĝin, ĝis la 1.ª Januaro, al**

**S-ro RICARDO QUILES, San Vicente, núm. 164 - VALENCIA**

---

*Jen la ĉefliteroj de la partoprenintoj en la 7.ª Tasko, kies laboro estis trafa kaj bonstila:*
**S. A. - M. J. - F. E. - M. T. - M. A. P. - A. E. - M. B. - E. P. - J. B. - S. R. - L. S. - A. M. - J. A. - R. M.**

*Post detala kontrolo de la plej korektaj tradukaĵoj ricevitaj, por juste elekti la plej bonan, ĉar ni ne volas juĝi trafe maltrafe, ni inkliniĝis akcepti tiun de nia baska samideano, S-ro Santiago Arizmendi, str. Ardanza, 9, 1.° - Eibar (Guipúzcoa), al kiu, laŭkutime, ni ekspedas la libropremion* ESPERANTO SESDEKJARA, *kune kun nia sincera admiro kaj gratulo. Kelkaj samideanoj sin turnas al ni kun la demando, ĉu nur* HEF*-anoj rajtas partopreni niajn lingvajn konkursojn; tial ke ni ne povas aparte skribi al ĉiuj, ni respondas de ĉi tie al la demandintoj, ke ĉiu ajn esperantisto, el kiu ajn asocio kaj lando, rajtas libere konkuri en niaj konkursoj. Ni atentigas niajn konkursantojn nur, ke ili atentu bone pri la limtempo de niaj konkursoj, ĉar pluraj konkursaĵoj trafas la konkursejon, kiam la Bulteno jam estas en la presejo. Konkuru vi ankaŭ do, amiko kaj amikino, kaj ni senpartie juĝos vian lingvan-kapablon, tial ke pri propra afero, neniu juĝas libere.* **Por via kontrolo, jen laŭ nia opinio la plej taŭga traduko de la koncerna teksto:**

«Como un enigma, ciertas rocas tienen formas extrañas. Algunas forman grutas y cuevas, donde pueden refugiarse mis visitantes cuando, por alguna causa, el cielo lagrimea lluvioso. Nuestro común amigo ha pasado muchas horas en esas grutas naturales. Libre de los ruídos y fastidios de la gran urbe, hablaba allí silenciosamente consigo mismo percatándose, con más intensidad que de costumbre, de su verdadera individualidad. Varias veces, incluso pernoctó en una cueva, tendido sobre un lecho de diversas hojas y secos helechos recogidos. Por eso, yo no tengo ya secretos para él. De noche, oía el ulular de los buhos y el canto de los ruiseñores... y al fin sentí que su alma y la mía armonizaban del todo».

*Fragmento de una descripción del bosque de Fontainebleau, en una carta de E. Lanti*

---

do: Usono - Kanado - Britujo - Aŭstralio, Hispanujo - Sudameriko, Francujo - Svislando-Belgujo, Germanujo-Svislando, ktp. La kosto eldoni komunan anglalingvan propagand-gazeton, ekz., por Usono-Britujo-Aŭstralio-Kanado estus relative malgranda. Kun eldonnombro de prok. 5000 ekzempleroj, la individua prezo estus tiel malalta, ke la naciaj organizoj povus ankoraŭ eldoni siajn apartajn tutesperantajn organojn, aŭ ilin kombini laŭvole. La propagandgazeto devus regule aperi ĉiumonate, aŭ almenaŭ ĉiudumonate.

3. Mallonge, mi petas niajn amikojn ĉesigi la tre bedaŭrindajn mensogojn kaj troigojn pri Esperanto en sia propagando. «L'Essor», ekz., bonvolu konstati, ke ne estas honeste propagandi, ke Usono dissendis radio-televidan filmon en Esperanto dum Oktobro, kiam temis pri simpla kvinminuta intervjuo, dum kiu ne pli ol dek vortoj en nia lingvo aŭdiĝis. Usonanoj kaj aliaj rimarku, ke la kvindekdu libroj (libropli ol 100 p.) eldonitaj inter 1948. kaj 1953 ne sufiĉas por praviĝi propagandon pri «centoj da gravaj kaj mondfamaj libroj eldonitaj en Esperanto post la milito, kaj dudek-mil libroj eldonitaj sume».

Kial ne diri la veron? Ni fieru pri niaj: «Kon-Tiki», «Ilustrita Vortaro de Esperanto» (aperonta antaŭ la fino de la jaro, en Meksiko), «Heroldo», «Esperanto», «La Praktiko» k. t. p. Sed ni propagandu honeste. Kaj precipe, ni apliku la supreskizitan eldonskemon (punkto 2) por ke de nun, kiam kursestro vidos korespondanoncon, bele verkitan en gazeto, kaj skribos por siaj kursanoj, li ne ricevos leteron tiel eraroplenan kaj nelegeblan, ke li devos mensoge diri al la kursanoj, ke respondo ne venis, kaj kaŝe bruligi la leteron...

**DONALD R. BROADRIBB**
**791 South Avenue ROCHESTER, 20 - New York (Usono)**

## LETERO DE FERVORA SAMIDEANO

**Jen denove la flamaj vortoj de la simpatia misiisto, Pastro Felikso de Valois Arana, kiu, reveninte de Gvineo, estas la ĉiama ekzemplodona fervorulo.**

Altestimataj gesamideanoj!

Ĝojplena estas mia koro, ĉar denove mi loĝas en la kara patrolando, el kiu mi eliris antaŭ kvar jaroj, por misiista laboro meze de afrika arbaro, en nia malgrandeta Gvinea teritorio, lasta drapeto de nia antikva kaj riĉa kolonia mantelo.

Kaj, spirante jam hejmajn aerojn en ĉi tiu urbeto, kie nun mi loĝas, estas al mi plej agrable sendi samideanajn salutojn al ĉiuj membroj de H. E. F. kaj K. E. H. A. Kvankam en la oktobra numero de nia Bulteno, nia kara kaj sindonema redaktoro diskonigis mian novan adreson —kion, cetere, tre bonvole mi dankas— tio ne sufiĉas por mia esperanta kreskanta fervoro; kaj, tial, mi deziras nun min denove prezenti al ĉiuj legantoj de nia gazeto.

Jen iom da historio: Antaŭ tri jaroj, mi estis invitata por la esperantlingva prediko, okaze de la 12ª Kongreso en Tarrasa; sed tio, bedaŭrinde, ne estis ebla, ĉar nek la poŝo nek la tempo permesis.

Pri mia agado en Gvineo, nur mi volas diri, ke, siamaniere, tie funkcias Esperanto Centro, ĉe la Seminario de Banapa, kiu konsistas proksimume el kvardek junaj nigruloj, preskaŭ ĉiuj esperantistoj, pli malpli perfektaj. Estus dezirinde, ke oni skribus al ili el diversaj lokoj; tian promeson mi faris al ili, ĉar ili deziras korespondadi kun hispanaj gesamideanoj.

Ĉi tie, en Castro-Urdiales, mi intencas gvidi baldaŭ kurson por gejunuloj. Mi jam faris propagandon; kaj, espereble, nia verda stelo ankaŭ oportune brilos ĉi tie.

Karegaj samcelanoj: Plaĉu al Dio, ke ni sukcesu en la diskonigado de nia celo kaj idealo. Neniam kiel nun, post la triumfo de nia Kongreso en Bilbao —kiun bedaŭrinde mi ne partoprenis, ĉar tiam ĝuste mi eliris el Gvineo— belaj perspektivoj malfermiĝas al hispana esperantistaro. Laboru, do, ni ĉiuj senhalte, neniam forgesante, ke nia celo estas vere inda je nia laboro, por la mondpaco kaj amo al la homaro.

Ni ne aŭskultu malspritegajn voĉojn, kiuj *deziras* —ho, kiaj friponoj!— *malfermi al ni la okulojn.* Ni scias bonege nian vojon, kaj eĉ blinde ni ĝin iros. Por Esperanto, ĉiam antaŭen! Tutkore via

**FELIKSO DE VALOIS ARANA**
**Colegio del Inmaculado Corazón de María**
**Castro-Urdiales (Santander)**

# INTER LA PROZO DE LA

Kiam oni perceptas, ke venas la fino de io, kio, kvankam ordinara, fariĝis kutimo eĉ en la rutino de la propra vivo, oni konscias subite, unuan fojon, ke tiu ŝajne banala kutimo estas ja forta radiko en la trunko de la ekzisto. Tial, ne facile estas forŝiri ĝin sen doloro, en la momento oferi ĝin por atenti kaj sekvi aliajn okupojn aŭ aliajn zorgojn, kiuj, siavice, tute regule ankaŭ alkroĉiĝos al la histoj de la karno kaj fandiĝos en la fluon de la sango...

Kaj nun, falantaj aŭtunaj folioj, kvazaŭ fatalaj sableroj en sorĉa sablohorloĝo, avertas, ke alproksimiĝas, kun la fino de la jaro, la fino de mia rolo, ĉar fantaziaj estaĵoj —kiel mi— konsistas nur el tiu nevidebla io, kiu, perdinte kontakton kun la homoj, malaperas kaj solviĝas en la eteron, kun la sola konsolo, kiel supre dirite, ke ne sen doloro la homoj nin perdas... Sed. ĝis la rando plej ekstrema de tiu anoncita fino, daŭre ankoraŭ mi petolos, inter la literoj de karaj titoloj.

Unua celitaĵo estu la skandinava kolekto: SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN amplekse aperigas intervjuon kun S-ro Teo Jung, kies multa sperto donas aŭtoritaton al la fermaj vortoj: «Ne necesas emfazi, ke precipe *la esperantistaro devos agi prudente kaj unuece,* kaj ke ĝi devos kuraĝe, fide kaj persiste sekvi sian vojon al la antaŭdestinita celo». Al tio la intervjuanto, S-ro Szilagyi, iomete amare respondas: «Jes, la antaŭdestinita celo! Ni scias ĉiuj, kion ni volas atingi. Sed, ne ĉiam ni pripensas, kiel ni devas agi nepre, *por atingi la celon en gloro».* ARBETAR ESPERANTISTEN liveras seriozan kaj valoran legaĵon, kiel organo de Sveda Laborista Esperanto-Asocio. NORVEGA ESPERANTISTO garnas sin per belaj poemoj, laŭ takto de la unuaj versoj, jam sur la fronta paĝo: «Birda kanto sub ĉiel' ĉie nun sonoras». DIA REGNO, la agrabla organo de Kristana Ligo, ĉiam freŝa en sia aspekto, kaj ĉiam simpatia en sia sinteno, prezentas treege interesan enhavon. Speciala artikolo «Galeroj kaj galeruloj» estas distra kaj instrua pro bonaj detaloj en historiaj klarigoj. DANKS ESPERANTO-BLAD, la dana kolego, raportas detale pri la nunjara jarkunveno en Kopenhago, kie la neŭtrala Ligo kaj la Laborista Asocio komune kaj profite

# ESPERANTISTA GAZETARO

laboris, sur la bazo de jam kelkjare fondita komunkomitato. En NIA VOĈO, honesta laborista voĉo de la dana asocio, mia bona amiko Poul Thorsen donas trafajn informojn en sia artikolo «Esperanto, unika perilo de ĉina literaturo». ESPERANTO-POST, kun sia kutima belaspekta formato, estas nun oficiala organo de la Germana Asocio; kvankam internaj skuetoj iom agitis la akvojn de la germana movado, la dezirata ekvilibro jam speguliĝas en la paĝoj de tiu revuo; kiu pravigas la merititan famon de la germana grafika arto. LA ĜUSTA VOJO, cirkulero por katolikaj esperantistoj, prezentas en siaj ampleksaj paĝoj tre varian materialon, en kiu lerte sinsekvas evangeliaj instruoj kaj amuzaj priskriboj. BULTENO de Esperantista Klubo en Praho estas ĝoje legata, ĉar fakte ĝi estas nun la sola ligilo por povi rilati kun la ĉeĥa samideanaro. En la nuntempa freneza mondo, bedaŭrinde, ĉion oni rigardas tra okulvitroj antaŭe kolorigitaj, laŭ propra konveneco aŭ... malico. Sekve, la verda koloro ŝajnas esti ruĝa ie, kaj flava aliloke; strange, plej strange... Tial, la honesta sinteno de tiuj bonaj amikoj meritas ĉie gratulojn kaj dankojn, kiujn mi tre sincere neniel ŝparas. NEDERLANDA ESPERANTISTO, kun sia grava aspekto de ĉiutaga ĵurnalo, liveras bongustajn legaĵojn, ĉar, sen malatento al organizaj aŭ administraj informoj, belaj literaturaj pecoj altigas la valoron de tiel ŝatata gazeto. En la numero, kiun mi ĵus legis plenmerite rangas la plaĉa rakonto: «La kastelo, kie ĉio estas ebla» de F-ino W. M. Smit, kiu, en la prozo-fako, akiris la unuan premion en Literatura Konkurso, okaze de la Beneluksa Kongreso. LABORISTA ESPERANTISTO, de la Nederlanda Federacio, donas impreson de respondeca fidindeco. Mi ne volas preterlasi la okazon gratuli plej volonte k-don F. Faulhaber, tre juste ĵus elektita, kiel membro de la Akademio. BELGA ESPERANTISTO atentas tre zorge la enlandan movadon, kompetente administrante ĝin. En aroga fronta artikolo, vive kuraĝa, ja mem la titolo sufiĉas: «Ĉiam antaŭen, ni iru!»

Jes, antaŭen... kiel ŝago en direkto al pun' de malbono, fendante la vaporon el griza nebulo de melankolio, en kiu baldaŭ solviĝos **LA LEGEMA KOBOLDETO**

# XV CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO

## Verano de 1954 en ZARAGOZA

**Reina gran entusiasmo entre los esperantistas de la bella capital aragonesa, con las tareas preparatorias en la organización del gran certamen nacional del esperantismo español que, a juzgar por el ambiente local, promete superar a todos los anteriores.**

**Como un avance informativo, que garantiza lo anteriormente expuesto, he aquí el magnífico conjunto de activos y valiosos amigos que, junto con una nutrida representación del elemento juvenil, constituyen el**

### COMITÉ ORGANIZADOR

| | |
|---|---|
| Presidente 1.º | D. Manuel Maynar Barnolas |
| Presidente 2.º | D. Alejandro Marqueta Roy |
| Vicepresidente: | D. Fernando de la Fuente Solsona |
| Tesorero: | D. José Guío Fierro |
| Vicetesorero: | D. Eugenio Ferrer Gómez |
| Secretario: | D. Salvador Morales Sada |
| Vicesecretario: | Srta. Pilar Larruga Rubio |
| Vocal de Prensa y Propaganda: | D. Antonio Marco Botella |
| Vocal de Actos Sociales: | Srta. María Casanovas Jarrete |
| Vocal de Alojamiento: | D. Juan Montañés Querol |
| Vocal de Exposiciones: | D. Eduardo Buesa Ibáñez |
| Vocal de CONCURSO LITERARIO: | D. José Martínez Martínez |

**La cuidada composición de este organismo garantiza la confección de un amplio y variado programa, en el que habrá sitio bastante para el trabajo, la cultura, el arte y el más sano esparcimiento. Con el fin de facilitar la asistencia de esperantistas extranjeros, éstos quedan exentos del pago de la cuota que, probablemente, será la misma de años anteriores. A la espera de los boletines de adhesión, pueden ya solicitarse informes y aclaraciones al**

COMITÉ ORGANIZADOR DEL
XV CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO
**Roda, 14-16 — ZARAGOZA**

# ANTAŬ LA 15ª DE DECEMBRO

Laŭ jam tradicia kutimo, ankaŭ ĉi-jare la Zamenhof-tago devas esti agrabla motivo por plifortigi la internan unuecon de niaj rondoj. Oni devas, do, aranĝi en tiu tago festajn vesperojn aŭ kolektivan manĝon, por kompletigi aliajn aspektojn de pli vasta agado, kiel ekzemple: publikaj kunvenoj, ekspozicioj, artikoloj en la gazetaro aŭ paroladoj en la radio-stacioj, kio certe utilos por popularigi la daton, en kiu antaŭ 94 jaroj naskiĝis la aŭtoro de nia lingvo. Oni ne forgesu ankaŭ, ke la Zamenhof-tago estas la tago de la Esperanto-libro, kaj nepre oni devas ĝin bone celebri, aĉetante luksan libron aŭ modestan broŝuron. Bonvolu informi nin detale pri la diversaj okazigitaj aranĝoj.

# HISPANA KRONIKO

**SABADELL.** — La 19an de Septembro, kun rekordnombra publiko, okazis la tradicia kursofina festo de la tiea esperantistaro en la salono de Kooperativo «La Sabadellense» kies prezidanto, S-ro Calafell, faris la inaŭguron post prezentaj vortoj de la sekretario de la Esperanto-Sekcio, S-ro L. Puig; la festo havis altan rangon pro la interesaj prelegoj de la urba veterano, S-ro Bracons, kaj profesoro Delfí Dalmau, el Barcelono. Post resumaj vortoj de la kursgvidanto, S-ro L. Mimó, oni distribuis librostokon al sukcesintaj lernantoj kaj membroj de Rondo de Libro-amikoj. Fine, laŭmodaj muzikaĵoj de gramofono agrabligis la vesperon al junaj gedancantoj.

En la sama Kooperativo funkcias nun nova kurso, sub la gvido de V. Mateu. Ankaŭ en la ekskursa societo «Tierra y Mar», kies prezidanto, S-ro Erill, estas mem esperantisto, daŭras kun kreskanta intereso la kurso gvidata de S-ro D. Escapa.

**CHIVA.**—En ĉi tiu bela urbeto de la Valencia provinco, fondiĝis grupeto kun kelkaj junuloj, kiuj, gvidataj de fervora samideano R. Jimeno, estas bona promeso por proksima estonteco. Por kuraĝigi ilin al plena kaj perfekta posedo de nia lingvo, estus oportune sendi al ili ĉiuspecajn esperantaĵojn: Dr. Nácher, n.° 13 (Correos).

# MUZIKA KAJ MONDLINGVA KONKURSO «ARIEL»

**Omaĝo al la urugvaja klasikulo, J. E. Rodó kaj lia ĉefverko «Ariel», trad. en Esperanto:**

**Kun penso pri la aktualiĝanta decido pri la mondlingvo, S-ro Gino Catarzi (Verona) kun la helpo de la Esperanto-Grupo de Verona iniciatis kaj asignis sume 50.000 it. lirojn por la jenaj belartaj konkursbranĉoj kaj por la, sub punkto 5, prezentita PREMIO JOSE ENRIQUE RODO.**

*1. Laŭro Kolomano Kalocsay.* Premio 10.000 it. liroj, por la plej bona originala muzika komponaĵo, kantebla, ĝis nun ne publikigita, kies baza teksto estas literaturvalora originala poeziaĵo en Esperanto (aperinta post la komenco de 1930). Unu persono rajtas konkursi per maksimume tri komponaĵoj. La teksto estu prezentita sub la muziknotoj.

*2. Laŭro Esperanto 1954.* Premio 10.000 it. liroj, por originala, ĝis nun nepublikigita poemo en Esperanto. Oni rajtas konkursi per 1 aŭ 3 poemoj, kun suma amplekso de 108 versoj·

*3. Laŭro Urugvajo.* Premio 10.000 it. liroj por *hispanlingva,* ĝis nun ne publikigita traduko de literaturvalora (j) originala (j) poemo (j) aperintaj post la komenco de 1930 en la lingvo Esperanto. Oni rajtas konkursi per 1 aŭ 3 poemoj, kun suma amplekso de 108 versoj.

*4. Laŭro Verona.* Premio 10.000 it. liroj a) por *versa* traduko, esperantlingva de la t. n. «balkona sceno» el *Romeo and Juliet* de Shakespeare de la vortoj: «Can I go forward when my heart is hare» (II-a akto 1-a sceno) ĝis la fino de la 2-a sceno, kaj parton de la lasta sceno de la tragedio, t. e. tiun parton de la 3a sceno el la 5a akto, kiu komenciĝas per la vortoj: «Enter Montague and other»; - b) aŭ por tradukita, eventuale originala, poeziaĵo en Esperanto, kies temo aŭ medio kaj etoso estas ligita al Verona. En la subbranĉo b) oni rajtas konkursi per 1 aŭ 3 poemoj kun 108 versoj. La du subbranĉoj estos kune juĝataj por la laŭro.

*5. Premio José Enrique Rodó.* 10.000 it. liroj, aljuĝota al la plej altvalora kaj arte plej elstara konkursaĵo el la kvar branĉoj, pli supre menciitaj.

**ĜENERALAJ INFORMOJ:**

Ĉiu poeto kaj komponisto de la tuta mondo rajtas partopreni la konkurson. Sendu ĉiun konkursaĵon en ses ekzempleroj al la konkursa sekretario D-ro F. Szilágyi, 3-dje Villag. 26. Boras (Svedlando). En la branĉoj 3 kaj 4/b aldonu la saman nombron de la (event.) originalaĵoj. Skribu vian pseŭdonimon sur la konkursaĵojn kaj ankaŭ sur apartan paperon kaj metu tiun lastan en fermotan koverton, kune kun via nomo kaj adreso. Pri la konservo de la anonimeco de la konkursantoj, en ĉiuj okazoj, respondecas la sekretario de la konkurso. Oni rajtas konkursi eĉ sub «verkista» nomo. Aldonu tri maldekstre stampitajn internaciajn respondkuponojn. Se enlanda regulo ne permesas la elsendon de tiom da kuponoj, sendu laŭ la validaj reguloj malpli. El tiuj landoj, kiuj tute ne permesas la elsendon de kuponoj, oni rajtas sendi konkursaĵojn sen aldono de ia kotizo.

**LIMTEMPO POR LA RICEVO DE LA KONKURSAĴOJ**

el eŭropaj landoj la 15a de Marto; por landoj ekster Eŭropo, la 10a de Aprilo, 1954.

*Pri la kunmeto de la diversnacia komisiono kaj pri la publikigo de la rezultoj en Montevideo, dum la aŭtuno 1954, detalaj informoj sekvos poste.*—Boras, Oktobro 1953.— **D-ro F. SZILAGYI**

# HISPANAJ PEJZAĜOJ: LA ALIA ĈARMO DE GRANADO

La turisma propagando pri la ravanta urbo Granado atentas abunde pri la araba palaco Alhambra kaj ankaŭ pri la tipaj dancoj; sed, nekompreneble, oni forgesas la imponan belaĵon de *Sierra Nevada* (Neĝa Montaro); kial? eble ĉar la montoj estas, ŝajne, ne facile atingeblaj vidindaĵoj. Por komenci, mi rimarkas, ke la plej bela pinto *Veleta* (Ventindikilo) estas atingebla eĉ per... aŭtomobilo, ĉar de Granado ĝis la supro de tiu pinto ekzistas la plej alte situata ŝoseo en Eŭropo. Cetere, eĉ tiuj, kiuj ne disponas je propra veturilo, povas simple atingi per tramo aŭ tri horoj da supreniro en pieda marŝado la saman pinton, vojaĝante tra belaj intermontaj vilaĝetoj, kiuj estas karakterize helaj kaj graciaj.

Sed, se vi volas, kara leganto, akompanu min en vizito, kiun sola mi faris, dum tago de pasinta Aprilo: kvankam bone mi konas la altajn Pirineojn, kie abundas ĉiuspecaj emocioj, en tuta sia imponeco, por amantoj de la naturo, mi havis la intencon atingi la plafonon de nia duoninsulo; kaj, sekve, profitante oportunan ŝancon, mi vojaĝis al Granado.

Bonŝance, nur ĵus alveninta, mi estis invitata suriri en aŭtomobilon, plena de skiistinoj ekirontaj ĝis la neĝo. En punkto 2000 metrojn alta, ili atingis la rifuĝejon por virinoj; kaj tiam mi devis piede daŭri sola, tra la neĝo kaj nebulo, por atingi alian rifuĝejon, kiun oni nomas Universitata kaj situas sur alteco de 2504 metroj. Afabla paro da gegardistoj donis al mi, kiel sola gasto, ĉiujn eblajn faciligaĵojn, tamen... ili ne povis forigi la nebulon; ĝis la dua tago, kaj jam vespere, mi ne havis la feliĉon vidi la ĉielon kaj la celitan pinton.

Certe, oni devas ja vivi en tiuj altaĵoj por ĝui nokte la ekstreman ravitecon, kiu la animon invadas, en plena ekstazo, antaŭ la spektaklo de tiuj pintoj, hele lumigataj de la neĝo, super niaj kapoj. Pasis ja sufiĉe da tempo, ĝis fine mi decidis enlitiĝi!...

Ĉio jam preta en la frua mateno, mi daŭris supren. La neĝo baldaŭ kaŝis la vojon; sed, konante la direkton, mi decidis iri tra la nebulo kovranta la pinton. Tamen, foje mi komencis pensi pri perdiĝo... kiam fantazia sunradio ŝirante la nebulon lumigis proksiman indikilon, kiu montris altecon de 3000 metroj. Nu, mia direkto estis ĝusta! Finfine la suno venkis la nebulon; tial, kun plena decido, mi ekatakis la lastan piramidon. Sed, en tiu etapo, la neĝo, pli mola kaj profunda ol aliloke, komencis venki min, glaciigante miajn piedojn, spite la fortan ledon de miaj botoj. Jen, laŭ du paŝoj supren kaj unu malsupren, fine mi atingis la pinton de la *Veleta* (3428 m), kie, post refortiĝo, nelacigeble mi fotografis interesajn bildojn kaj skribis saluton en speciala libro, kiu tie troviĝas.

La panoramo, kiun oni povas rigardi de tiu pinto estas kvazaŭ dia vidaĵo. Mi diru nur, ke de tiu alteco estas videblaj 200.000 kvadrataj kilometroj. Ĉe la nordo, sub niaj piedoj, kuŝas Granado kun sia verda kamparo, vera oazo en la varma Andaluzio; en la maldekstra flanko, oni vidas tre proksima la plej altan monton (3481 m.) kiu estas nomata Mulhaceno, je memoro de la antaŭlasta araba reĝo, kiu estis entombigata, laŭ propra deziro, en tiu pinto. Nepre, mia penso flugas al tiuj pasintaĵ tempoj; mi imagas la funebran karavanon, kiun gvidis mem la belulino Zoraja (matena stelo) por plenumi la lastan reĝan deziron. Ĉeno da gigantaj montoj iras en tiu direkto; kun iom da timo kaj multa prudento, mi admiris la abismon, je nomo la Kaldrono, kun profundeco de 500 metroj.

En okcidento ankaŭ estas ĉeno da montegoj, iom pli malaltaj; tamen, la tieaj krestoj estas vere imponaj. Se oni rigardas suden, oni vidas tute neimageblan panoramon: En proksimeco, jen zonoj kun ĝardenoj, kie daŭre burĝonas floroj kaj maturiĝas fruktoj; t. e. tute proksime al eternaj glaciejoj, oni povas rigardi florojn kaj fruktojn, simple turnante la kapon. Kaj tio ĉi estas ja mirinda kaj admirinda ĉarmo de ĉi tiu grandioza regiono. Pli suden, la maro aperas al niaj rigardoj laŭ maniero, ke oni povas eĉ rimarki la kurbecon de la Tero; kaj, por fermi la vidaĵon, en malproksimeco, tra la nebulo, estas videblaj la marokaj montaroj, kaj eĉ oni divenas la silueton de la rokego de Gibraltaro.

Do, kara leganto, jen per mallongaj kaj mallertaj trajtoj la skizo pri tio, kion mi sukcesis ĝui, suprenirante tra zigzaganta vojo 49 kilometrojn longa, ekstere de Granado; estas avertinde, ke somere la vojo ne havas neĝon, do pli facile alirebla. Tamen, en alia sezono, se la vojo pli malfacila, ankaŭ la vidaĵo estas sendube pli bela, pli natura, pli impona... Jes, certe oni povas aserti: Ju pli malfacila la celo, des pli loga ĝi estas!

**SALVADOR MORALES** (Zaragozo)

# FACETAS DEL MOVIMIENTO ESPERANTISTA

● FRANCIA.—El periódico «L'Aisne Nouvelle», de Saint Quintin, publicó en su número del 28 de Agosto una crónica sobre el Congreso Español de Esperanto, celebrado en Bilbao.

En la Universidad de la Sorbona, y bajo la dirección del profesor Lucien Laurat, docente de Economía Política, con la participación de un grupo de diez profesores de distintas nacionalidades, se celebran «Los Viernes Culturales», cuyas conferencias son en Esperanto.

● ITALIA.—La fábrica de máquinas para coser «Vittorio Necchi», de Pavia, con marcas oficiales «B. F.» y «B. U.», últimamente ha sacado al mercado los modelos «B. F.-Nova» (Nueva) y «B. U.-Nova» (Nueva), y en la Feria de Milán expuso el modelo «B. U.-Mira» (Maravillosa). El empleo de nomenclatura esperantista en productos industriales no es de hoy, y en España tenemos las célebres tintas para escribir «SAMAS» (Misma).

● AUSTRIA.—La Dirección general de Correos editará el año próximo un sello alusivo al Esperanto, con motivo del cincuentenario de la Federación Esperantista de Austria.

En la ciudad de Klagenfurt se ha rotulado una calle con el nombre de «Dr. Zamenhof».

● SUECIA. —«Statens Tradgardsforsok», granja experimental del Estado en Alnarp (Akarp), en las proximidades de Malmo, utiliza el Esperanto para los resúmenes que reparte acerca de sus trabajos de investigación sobre frutales, legumbres y plantas ornamentales, a las Universidades, Bibliotecas y Campos de experimentación agrícola.

Después del éxito de la «Semana Sueca», en Frostavallen, bajo el tema «Intercambio Cultural Internacional» (véase BOLETIN núm. 55, pagina 498), que obtuvo repercusiones en la prensa sueca y de otros países, así como de la U. N. E. S. C. O. se está organizando para 1954 otra «Semana», que tendrá lugar del 8 al 15 de Agosto.

● HOLANDA.—El 39 Congreso Universal de Esperanto se celebrará el año próximo en Haarlem, cerca de Amsterdam, ciudad célebre por sus campos de tulipanes.

Después del 5.º Congreso de Ferroviarios Esperantistas, celebrado en Utrecht, se han hecho eco de dicha reunión internacional, en la que se trataron temas técnicos sobre el ferrocarril, las revistas «S. J. Nytt» del personal ferroviario sueco; «Arts Cheminots», órgano de la Unión Artística y Cultural de los ferroviarios franceses; «De Band», órgano de «van Gend en Loos», asociación de los ferrocarriles holandeses; «Rautatielainen», periódico sindical de Finlandia; y «Der deutsche Eisenbahne», órgano del sindicato ferroviario alemán.

Visitó la ciudad de Eindhoven un grupo de miembros del Club Esperantista de la fábrica «Télémecanique Electrique», de Francia (véase BOLETIN núm. 53, página 48 ). El grupo, dirigido por el ingeniero señor Watier, visitó la fábrica matriz de la casa «Philips», comprobando la facilidad prestada por el Esperanto en esta excursión al extranjero.

El profesor Lakshmiswar Sinha, de la Universidad de Santiniketan (India), en viaje por Europa, comisionado por la U. N. E. S. C. O., desarrolla una serie de conferencias culturales en Esperanto. Después de su disertación en la Semana de Frostavallen (Suecia) y otros lugares, habló en Woudschoten durante la reunión anual de «Universala Ligo».

● BELGICA.—En el Grupo Esperantista «La Verda Stelo», de Amberes, la señora L. Bernaerts —a quien no hace mucho tuvimos en nuestra compañía— pronunció una charla sobre su viaje por España, tan bella en su variedad, y la buena aceptación tenida entre los esperantistas españoles, charla que fué muy del agrado de los oyentes.

● INGLATERRA.—«Health and Life», revista inglesa mensual, ha iniciado la publicación de una página del idioma Esperanto, como consecuencia de la reseña del libro «L'arto fariĝi centjara». (El arte de hacerse centenario). Direc.: 396 City Road - LONDON E. C. 1.

CURSOS POR CORRESPONDENCIA

*Con el deseo de ampliar y favorecer la utilización de este servicio, se ha iniciado el sistema de «Curso colectivo para Grupos», para aquellas localidades donde hayan varios interesades en aprender el Esperanto y no dispongan de profesor para seguir un curso verbal. Dará amplios detalles al respecto:*

**CURSOS DE ESPERANTO POR CORRESPONDENCIA**

Calle Forn, núm. 19 — MOYÁ (Barcelona)

**Se vuelve a rogar a todos los que sepan de artículos referentes al Esperanto, publicados en la prensa española, remitan un ejemplar del periódico al encargado de «Gazetara kaj Radio-Servo»: Darío Rodríguez - Galileo, 51, 5.º - Dcha. MADRID - quien agradece los envíos recibidos.**

**LA NORMANDAJ RAKONTOJ** kolekto da 19 noveloj de Guy de Maupassant. Tradukis el la franca lingvo Roland Dupuis, kun antaŭparolo, enkonduko, biografieto kaj portreto de la aŭtoro. Ilustraĵoj laŭ la originalaj kliŝoj uzitaj en la franca verko. 8 apartaj tutpaĝaj bildoj pri Normandio (el kiuj 2 koloraj), komentitaj per notoj historiaj-geografiaj. Formato: 22'5 x 15'5 cm. 210 tekstpaĝoj, kun pluraj bildserioj. Eldonita de Eldona Societo Esperanto, Fack 19071, Stockholm 19 (Svedujo) Prezo: 115 pesetoj. Mendebla kaj akirebla ĉe Libro-Servo de Hispana Esperanto-Federacio.

Nova gemo, tre valora, brilas en la trezorejo de la Esperanta libraro. Jes, kun fiero kaj plaĉo, oni tenas en la mano la belegan volumon, kiu, bindita per grize-bruna tolkovrilo, kun ora titolo-desegnaĵo, estas arta prilaboro de la fama sveda eldonejo, ĵus gajninta freŝajn laŭrojn per ĉi tiu admirinda verko de la konata aktivisto kaj talenta tradukinto S-ro R. Dupuis. Je pure teknika tipografia vidpunkto, la libro estas absolute senmanka: Trafaj bildoj, en netaj kliŝoj, estas eleganta ornamo por preso treege klara, al kio kontribuas la rimarkinde videblaj litertipoj, kiuj, kun aroga trajto en siaj cirkumfleksoj --ho, niaj karaj kaj ĉarmaj signetoj-- pompas sur la ebura blankeco de unuaklasa papero. Al tiel loga eksteraĵo adekvate respondas la alta kvalito de la enhavo, en kiu mirinde kaj agrable harmonias la brava impeto de la originalo kun la flua stilo de la traduko.

El inter la abunda verkaro de Guy de Maupassant, elstaras liaj noveloj aŭ rakontoj, kiuj estas naŭdekprocente aŭtentikaj historioj. Deknaŭ el tiaj historioj, kies agado okazas en farmbienoj kaj vilaĝetoj el Normandio, formas la bukedon, kiu nun sin prezentas, en luksa fasono, al la tutmonda esperantistaro. Ĉiu el tiuj noveletoj estas profunda leciono de kamparana psikologio; en la komenco de ĉiu epizodo, sufiĉas nur kelkaj vortoj, majstre plektitaj, por krei kaj elvoki la medion de simpla malsimpla temo, kiu tuj ŝpruce elverŝiĝas en neatenditajn aspektojn, rapide submetitajn al konkretaj direktoj, jam ĉe la rando de la fino, ordinare garnita per la kruda fatalismo de la morto... Tial, do, la legado de ĉiu aparta peco estas distro, sed serioza distro! Eĉ pluraj trafe lokitaj komikaĵoj liveras, inter ridetoj, instruojn kaj pripensojn. Kvankam la rakontoj por ĉi tiu kolekto estis zorge kaj lerte elektitaj, enŝoviĝis unu --tiu sub la titolo «Patro Milon»-- kiu, se vere ja taŭga, pro sia kuraĝo kaj ardo, por la mentalo de nacia publiko, ankaŭ povas esti pro tio mem tro nacieca, iomete tikla kaj eĉ neoportuna por la kriterio de internacia legantaro.

Kaj nun, jen la punkto plej ŝatata, plej specife nia: la lingvo de la traduko! Laŭ postulo de propra devizo: Ju pli grava la verko, des pli rigora la recenzo, longe mi akrigis krajonon, kiel solan ilon en la sporto ĉasi malkorektaĵojn. Sed... vane! De komenco ĝis fino, la lingvo de S-ro Dupuis min kaptis kaj logis --la ĉasisto estis ĉasata!-- ĉar, akorde kun la ĝenerala aranĝo, ĝi estas eleganta, facila, glata, korekta kaj, super ĉio, klara, ege klara, tiel klara, ke, malgraŭ la funda senco de multaj periodoj, la teksto ĉiam malkaŝos sian plenan signifon eĉ al tiu komencanto, kiu decideme alpaŝos al ĝia legado. Jen granda merito por la saĝa principo, kiun S-ro Dupuis maltime svingas en la enkonduko: Ne traduki vortojn por ekzamenanto, sed traduki pensojn por ĉiuj legantoj! Nu, al ili mi rekomendas frandi la legaĵon.

Tamen... iom *spiteme,* almenaŭ por ekuzi la pinton el grafito de la preta krajono, mi notis difektetojn en la interpunkcio, kiuj bedaŭrinde abundas, pro avara ŝparemo --ĉu ankaŭ normanda?-- de komoj, tra la tuta libro, ŝajne pro influo de ia stranga skolo, kiu minacas transformiĝi en sistemo ne bonvena en niaj vicoj. Ĉu mi parolas tiel, ĉar preskaŭ profesia korektisto de presprovaĵoj? Eble; sed, tiuokaze, fakaj ekspertoj -kial ne la Akademio?- ekzamenu la aferon kaj diru sian opinion pri la eblo doni unuecan formon al tiu flanko de nia skribo, plej konsekvence kun la logiko.

**LUIS HERNANDEZ**

---

**LA JUNAJ DETEKTIVOJ** de J. H. Sullivan, kun ilustraĵoj de Brenda Goodwin. Eldonita de «The Esperanto Publishing Company. Ltd». (100 Long Lane — Rickmansworth — Herts. Anglujo). 43 paĝoj. Formato 12 x 18. Prezo: 2 ŝilingoj, ĉe U. E. A. aŭ 12 pesetoj ĉe la hispana Libro-Servo.

Mi tralegis tiun ĉi rakonton pri kontrabandistoj. Ŝajnas al mi, ke ĝi estas taŭga por tiuj geknaboj, kiuj emas legi aventurojn kaj samtempe deziras praktiki legadon en nia lingvo. Jam la aŭtoro diras en sia antaŭparolo: «Ĉi tiu libreto estas verkita precipe por tiuj geknaboj, kiuj lernas Esperanton en lernejoj». Jen rekomendinda celo, praktike aplikata en ĉi tiu libreto, kiu, fidela al la principo de la aŭtoro, estas facile legebla, laŭ tuta amplekso de sia interesa enhavo. **JUAN DEVIS**

**EN VISPERAS DE AÑO NUEVO** hay que prepararse a cumplir con los deberes federativos y pagar la cuota correspondiente a 1954. Tenemos la satisfacción de anunciar que las tarifas para el año entrante *no sufren ningún aumento,* siguiendo las mismas, a saber:

**Socio de número: 15 ptas. — Socio abonado: 40 ptas. — Socio protector: 75 ptas.**

**Los socios de número no reciben el BOLETIN; los socios abonados reciben un ejemplar y los protectores DOS ejemplares**

## ☆ LA LERNEJO

Jam en la nova kurso, ni deziras saluti ĉiujn studentojn de nia kara lingvo, kaj ni esperas povi helpi ilin tra la lernperiodo, kiun ni ĵus komencas. La pordo de nia *Lernejo* estas malfermita por ĉiuj; kaj, atendante demandojn kaj dubojn, ni profitas la okazon por klarigi lastan regulon. La Akademio de Esperanto decidis oficialigi la sufikson END kun jena defino:

*Kiu devas esti -ata* aŭ *kiun oni estas devigata -i,* pro materia aŭ morala trudo.

Du ekzemploj por klarigo: Vilaĝo, *kiu devas esti* konstru*ata*=Vilaĝo konstru*enda.* Leciono, *kiun oni estas devigata* lern*i*= Leciono lern*enda.*

ESPERANTAJ KURSOJ PER KORESPONDADO
**Str. Forn, núm. 19 ○ MOYÁ (Barcelona)**
**R. MOLERA** - Direktoro

## PARA NUESTRO BOLETIN

(Donativos correspondientes a NOVIEMBRE 1953)

| | | |
|---|---|---|
| Suma anterior | 5.015 | Ptas. |
| Puigcastellar - Santa Coloma | 15 | » |
| L. Ballesteros - Málaga | 10 | » |
| G. Lenaers - Valencia | 10 | » |
| I. Alvarez - Madrid | 15 | » |
| S. Collado - Sama Langreo | 4 | » |
| V. Ortiz - Pamplona | 10 | » |
| J. Muñoyerro - Bilbao | 25 | » |
| E. Roca - Tarrasa | 5 | » |
| J. Pérez T. - Valencia | 10 | » |
| J. Bolea - Zaragoza | 5 | » |
| P. Criach - Sabadell | 15 | » |
| R. Barrufet - Barcelona | 15 | » |
| M. Alamo - Valverde-Hierro | 15 | » |
| J. Puértolas - Zaragoza | 15 | » |
| J. Aragay - Barcelona | 25 | » |
| P. Moreno - Madrid | 25 | » |
| F. M. F. - Montevideo | 16 | » |
| R. Gisbert - Barcelona | 25 | » |
| Total | 5.275 | » |

*Aún llevamos retraso con el año pasado...*

**¡MUY INTERESANTE!**
Acaba de aparecer la nueva edición del libro
**GRAMATICA Y VOCABULARIO DE ESPERANTO** del Doctor Bremón
**Precio: 45 pesetas**
Pedidos a:
Libroservo de Hispana Esperanto-Federacio
Pelayo, núm. 7 — VALENCIA

## ANONCETOJ

Ĉiu katolika esperantisto devas helpi la eldonadon de VOJO, VERO, VIVO, abonante ĝin kaj sendante mondonacon. Minimuma jarabono: 18 pesetoj (6 UL-steloj). Pri la hispanaj abonoj peras J. L. Aldeguer Jaén Str. Torrente de Vidalet, núm. 42, 1.°, 1.ª
BARCELONA (12)

Sendas al ĉiuj hispanaj geesperantistoj sian koran saluton, okaze de sia 70-jaraĝa festo kaj 40-jara esperantistiĝo.
S-ro Jules Leburgue
66, Rue J. Bte. Delescluse - CROIN **(Nord) Francio**

Dum Pasko, du francoj vizitos motorcicle Hispanion. Volonte ili korespondos kun hispanoj por esti gvidotaj, dum ilia veturado; ili ne volas monhelpon!
S-ro Raymond Furon
Chemin des Chalets - ANGERS **(M. et L.) Francio**

**¡ATENCION!** Tengo interés en recibir sobres con el matasellos utilizado durante el Congreso de Valencia en 1934. Me interesan matasellos de Congresos y viñetas de propaganda de Esperanto. Escribid a Evaristo Gil - Calders, 9, 3.° - BARCELONA

## RADIO "JUVENTUD" de La Coruña

Laŭ iniciato de la ĉefparolisto, S-ro F. Ortega, oni uzas logan sistemon en la Esperanto-Kurso, kiu estas klarigata kun samtempa telefonado al la lernantoj, kiuj sekvas la kurson kaj nombras jam 50.

**Bonvolu sendi gratulojn kaj materialon al**
**Radio "Juventud" - Str. Real, 71, 1.°-La Coruña**

## LOTERIA NACIONAL

Aproximándose la fecha del sorteo de Navidad, avisamos que todavía podemos servir participaciones de nuestros

**Núms. 22.195 - 39.454**

Rogando a todos los que deseen participar, hagan sus encargos cuanto antes al encargado de este servicio

*EMILIO PRADES - Derechos, 39 - Valencia*

PERIS-GRAN VIA M. TURIA, 28-VALENCIA